


Kelkaj vidindaĵoj en Anĵuo

À voir en Anjou



Fontoj / Sources:

https://fr.wikipedia.org/wiki/Liste_de_personnalités_nées_en_Anjou
https://wiki-anjou.fr/index.php/Liste_des_personnalités_de_Maine-et-Loire
<https://www.enpaysdelaloire.com/visites/musees-et-centres-d-interpretation/hotel-dieu-et-apothicairerie-de-bauge>
<https://chateau-bauge.fr>
<https://www.bioparc-zoo.fr>
<https://www.anjou-tourisme.com/fr/voir-faire/que-visiter/tous-les-sites-visiter>
<https://www.pop.culture.gouv.fr/notice/merimee/IA49006879>


Espéranto-Angers

<https://www.esperanto-angers.fr>
info@esperanto-angers.fr

2025-07-31

La limoj de historia Anĵuo etendiĝas trans tiuj de la nuna departemento Maine-et-Loire.

Vidu la apudan mapon.



--- ANGERS ---



La Arbejo en Angers

Kvar ĝardenoj, la Ombrejoj, la Provaĵoj, la Kvin sensoj kaj la Biotopoj, riĉaj je pli ol 20 000 plantoj, inkluzive de arboj, arbustoj, grimplantoj, plurjaraj, unujaraj kaj bulbaj plantoj kaj gazonoj, reklamas la hortikulturan heredaĵon de nia regiono.

L'Arboretum

Quatre jardins, les Ombrages, les Essais, les Cinq sens et les Biotopes, riches de plus de 20 000 plantes, concernant aussi bien les arbres, les arbustes, les plantes grimpantes, les plantes vivaces, les annuelles, les bulbeuses ou les gazons, valorisent le patrimoine horticole de notre région.



La domego de la Reĝo de Pollando

Tiu eleganta konstruaĵo, parte detruita, datiĝas de la 16-a jarcento. Bedaŭrinde, longatempe oni ne prizorgis ĝin. Nur de kelkaj jaroj, la Angers-urbeŝtaro renovigis ĝin. Ĝia nomiĝo restas mistera : ŝajnas, ke neniuj ajn pola reĝo rilatis kun tiu domo.

La maison du Roi de Pologne

Cet élégant édifice, en partie détruit, date du XVI^e siècle. Malheureusement, pendant longtemps, on l'a négligé. Il y a quelques années seulement, la ville d'Angers l'a rénové. Son nom reste mystérieux : il semblerait qu'aucun roi polonais ne soit associé à cette maison.



La kastelo

Du arkitekturoj, du kasteloj intermiksiĝas ĉi tie ; unue la fortreso de Ludoviko la 9-a, kun la rigoreco de siaj turoj kaj la masiveco de sia ĉirkaŭemparo, due la kortega kastelo de la dinastioj de Anĵuo, kun la elegantaj konstruaĵoj kaj la agrablaj ĝardenoj.

Le château

Deux architectures, deux châteaux s'entremêlent ici : d'une part la forteresse de Louis IX, avec la rigueur de ses tours et la massivité de ses remparts qui l'entourent et d'autre part le château de cour

des dynasties d'Anjou, avec ses élégantes bâtisses et ses agréables jardins.



Apokalipso

Kun longeco de 103 metroj, alteco de 4,5 m kaj kun siaj 70 scenoj, la tapiŝaro Apokalipso estas hodiaŭ la plej malnova tiom granda tapiŝaro en la mondo.

L'Apocalypse

Avec une longueur de 103 mètres, une hauteur de 4,5 m et ses 70 scènes, la tapisserie de l'Apocalypse est aujourd'hui la plus ancienne tapisserie de ce type au monde.



La abatejo "Toussaint", muzeo David d'Angers

La ruinoj de la abatejo *Toussaint* estis rearanĝitaj en 1983, kun travidebla tegmento, por kunigi la verkojn de la skulptisto de la romantika epoko, *David d'Angers* (1788-1856), kiu naskiĝis en Angers.

L'abbaye « Toussaint », musée David d'Angers

Les ruines de l'abbaye de Toussaint ont été réaménagées en 1983, avec une toiture transparente, pour réunir les œuvres du sculpteur de l'époque romantique, David d'Angers (1788-1856), né à Angers.



La Belarta Muzeo

Tiun prestiĝan loĝejon oni konstruis inter 1486 kaj 1493 por *Olivier Barrault*, trezoristo de la Reĝo kaj urbestro de Angers. En la 17-a, 18-a kaj 20-a jarcentoj, la konstruaĵoj estis amplekse modifitaj. La muzeo arigas pentraĵojn kaj skulptaĵojn el la 19-a jc, ĉefe el Anĵu-devenaj artistoj.

Le Musée des Beaux-Arts

Cette demeure de prestige a été construite entre 1486 et 1493 pour Olivier Barrault, trésorier du Roi et maire d'Angers. Aux XVII^e, XVIII^e et XX^e siècles, les bâtiments ont été profondément modifiés. Le musée regroupe des peintures et sculptures du XX^e siècle, principalement d'artistes d'origine

angevine.



La Turo « Saint-Aubin »

Eksa abatejo *Saint-Aubin*, fondita en la 6-a jarcento, sub regado de samnoma episkopo (534-549). La posedaĵoj de la abatejoj kanonikoj etendiĝis ĝis la nuntempaj limoj de la Angers-komunumo. El la abatejo nur restas tiu turo, 54 metrojn alta, konstruita komence de la 12-a jarcento.

La tour Saint-Aubin

Ancienne abbaye Saint-Aubin, fondée au VI^e siècle, sous la règle d'un évêque du même nom (534-549). Les propriétés des chanoines de l'abbaye s'étendaient jusqu'aux frontières contemporaines de la commune d'Angers. De l'abbaye il ne reste que la tour, haute de 54 mètres, construite au début du XII^e siècle.



La Blua Domo

La originaleco de la Blua Domo temas pri la mozaiko de sia eleganta dekoraĵo, kiu estas unu el la plej belaj dekoraĵoj en franca privata arkitekturo. La Blua Domo estas unu el la malmultaj ekzemploj de arkitekturo "Artdekorista stilo" en Angers. Isidore Odorico estis la mozaikisto.

La Maison Bleue

L'originalité de la Maison Bleue réside dans la mosaïque de son décor élégant, qui est l'un des plus beaux décors de l'architecture privée française. La Maison Bleue est l'un des rares exemples d'architecture « Art Déco » à Angers. Isidore Odorico en était le mosaïste.



La Kanonikejo Saint-Martin

Malkovru la plej malnovan preĝejon en la urbo kaj ĝian unikan arkitekturon. Atestanto de historio, ĉi tiu loko subtile kombinas kulturheredaĵon kaj nuntempan arton per ekspozicioj. Ĝi estas nepre vidinda loko por la ŝatantoj de historio kaj arto.

La Collégiale Saint-Martin

Découvrez la plus vieille église de la ville et son architecture unique. Témoin de l'histoire, ce lieu allie avec subtilité, le patrimoine et l'art contemporain à travers des expositions. C'est un lieu

incontournable pour les amateurs d'histoire et d'art.



La Domo de Adamo

Ĝi estas aparte tipa de la burĝaj komercaj loĝejoj en fino de Mezepoko. Konstruita iom antaŭ la jaro 1500, temas pri belega atestaĵo de ĉarpent-arto. Ĝia nomo verŝajne venas de la figuroj pri Adamo kaj Eva, kiuj ĉirkaŭis la vivarbon ĉe angulo de la ter-etaĝo : la arbo plu estas, ne la 2 figuroj.

La Maison d'Adam

Elle est particulièrement typique des demeures commerciales bourgeoises de la fin du Moyen Âge. Construite un peu avant l'an 1500, elle est un beau témoignage de l'art de la menuiserie. Son nom vient probablement des figures d'Adam et Ève qui entouraient l'arbre de vie au coin du rez-de-chaussée : l'arbre est toujours là sans les 2 figures.



La katedralo

Impresiva fasado de la 12-a jarcento allogas vizitontojn kaj multkolora portalo kun sia primitiva porĉo akceptas ilin. Interne, la ununura navo estas ĉefverko de la arkitekturo en la 12-a jarcento. La ĉefaltaro kun sia "gloro" (ornamaĵo), en orumita ligno laŭ baroka stilo, originas de 1758. La katedralo kunigas unuarangan aron da vitraloj de la 12-a ĝis la 16-a jarcento.

La cathédrale

Une impressionnante façade du XII^e siècle attire les visiteurs et un portail multicolore avec son porche primitif les invite à entrer. À l'intérieur, la nef unique est un chef-d'œuvre de l'architecture du XII^e siècle. Le maître-autel avec sa « gloire », en bois doré de style baroque, date de 1758. La cathédrale possède un ensemble de vitraux de premier ordre du XII^e au XVI^e siècle.



La Granda Teatro

Staranta sur la Place du Ralliement, tiu teatro, inaŭgurita en 1871, prezentas la kutimajn aranĝojn de tiutempaj teatroj. En 1992-1994 oni ebligis la kreadon de ekspoziciejo je 400-m² sub la spektaklahalo. La fasado estas inspirita de la grandaj francaj arkitekturaĵoj de la 16-a kaj 17-a jarcentoj.

Le Grand Théâtre

Situé sur la place du Ralliement, ce théâtre inauguré en 1871 présente les dispositions habituelles des théâtres de l'époque. En 1992-1994, un espace d'exposition de 400 m² a été créé sous la salle de spectacle. La façade s'inspire des grandes compositions françaises des XVI^e et XVII^e siècles.

de spectacle. La façade s'inspire des grandes compositions françaises des XVI^e et XVII^e siècles.



Muzeo Pincé

La loĝejo Pincé estas unu el la plej rimarkindaj pecoj de la civila arkitekturo de la Renesanco. Finkonstruita de Jean de Pincé en 1535, ĝi estis heredigita al la urbo en 1860 de la anĝeva pentristo Bodinier. Oni admiras pentraĵojn, objektojn de la Renesanca epoko kaj egiptajn, grekajn, romiajn antikvaĵojn kaj objektojn el Ĉinio kaj Japanio, k.t.p.

Logis musée Pincé

Le Logis Pincé est l'une des pièces les plus remarquables de l'architecture civile de la Renaissance. Achievé par Jean de Pincé en 1535, il fut légué à la ville en 1860 par le peintre angevin Bodinier. On admire des tableaux, des objets de la Renaissance, des antiquités égyptiennes, grecques, romaines, des objets de Chine et du Japon, etc



Parkoj kaj ĝardenoj

Pluraj parkoj verdigas la etoson en Angers, la Parc de la Garenne kaj la ĉea Parc de la Haye, la Jardin du Mail, la Jardin des Plantes, la Jardin de l'Arboretum kaj multaj aliaj.

Parcs et jardins

Plusieurs parcs verdissent l'espace à Angers, le Parc de la Garenne et le Parc de la Haye qui lui est contigu, le Jardin du Mail, le Jardin des Plantes, le Jardin de l'Arboretum et bien d'autres.



La abatejo Saint-Serge

La abatejo estis fondita komence de la 7-a jc, fare de la merovidaĵoj, inter la inundiĝemaj herbejoj de la rivero *Maine* kaj iu malnova romia vojo. La abatejo disvolviĝis dank'al la subteno de la grafoj de Anĵuo (1046-1056). Nuntempe, la abatejaj konstruaĵoj kaj tiuj de la seminario estas asignitaj al la mezlernejo *Joachim du Bellay*.

L'abbaye Saint-Serge

L'abbaye est fondée au début du VII^e siècle par les rois mérovingiens, entre les prairies inondables de la Maine et une ancienne voie romaine. De 1046 à 1056, l'abbaye se développa grâce à l'appui des comtes d'Anjou. Actuellement, les bâtiments abbaciaux et ceux du séminaire sont affectés au lycée Joachim du Bellay.



Espéranto-Angers, nia biblioteko

Ni havas la plezuron bonvenigi vin en nia ovala ĉambro de 1 000 m², kun ĝiaj 20 000 volumoj, kiuj disponeblas al vi. La bretoj longas proksimume 2 liniajn km-ojn da libroj. (*Legu la lastpaĝan noton*)

Espéranto-Angers, notre bibliothèque

Nous aurons le plaisir de vous accueillir en notre salle ovale de 1 000 m², avec ses 20 000 volumes qui seront mis à votre disposition. Les étagères représentent environ 2 km linéaires de livres. Remarque en dernière page.



Cointreau

La distilejo *Cointreau* estis fondita en 1849 straton *Saint-Laud* en *Angers* fare de fratoj *Adolphe* kaj *Édouard-Jean Cointreau*. Ĝi tiam estis establita en 1857 placon *Molière* kaj kajon *Gambetta*. Ilia unua sukceso estis *guignolet*, ĉerizalkoholo. Nuntempe la distilejo situas en *Saint-Barthélemy-d'Anjou*, najbare de *Angers*.

Cointreau

La distillerie Cointreau est fondée en 1849 rue Saint-Laud à Angers par les frères Adolphe et Édouard-Jean Cointreau. Elle sera ensuite implantée en 1857 place Molière et quai Gambetta. Leur premier succès est le guignolet, alcool de cerise. Actuellement la distillerie est située à Saint-Barthélemy-d'Anjou, ville voisine d'Angers.



La hospitalo Sankta Johano

Ĝi estas la plej malnova el la francaj hospitaloj, kiuj ankoraŭ ekzistas kaj estas unu el la plej rimarkindaj ĉefverkoj de civila arkitekturo, el epoko kies nur kelkaj el la religiaj konstruaĵoj estas konservitaj ĝis hodiaŭ.

Tie estas ekspoziciata la moderna mur-tapiŝaro de Jean Lurçat : *Le Chant du Monde* (La Kanto de la Mondo).

L'Hôpital St-Jean

C'est le plus ancien des bâtiments français encore existants et c'est l'un des chefs-d'œuvre les plus remarquables de l'architecture civile, d'une époque où seuls quelques édifices religieux ont été conservés à ce jour. La tapisserie moderne de Jean Lurçat : « Le Chant du Monde » y est exposée.



Kanto de la Mondo

La "*Kanto de la Mondo*" konsistanta el dek paneloj, entute 80 metrojn longaj kaj 4,5 metrojn altaj, estis akirita de la Angers-urbeŝtaro, kaj nun estas prezentata en la Eksa Hospitalo Sankta Johano (12-a jarcento).

Le Chant du Monde

Le "Chant du Monde", constitué de dix panneaux totalisant 80 mètres de long et 4,5 mètres de haut, a été acquis par la ville d'Angers et est aujourd'hui présenté dans l'Ancien Hôpital Saint-Jean (XII^e siècle).



La preĝejo de La Triunuo

Ĝi dependis de la najbara abatejo *Ronceray* kaj datumas de la dua duono de la 12-a jarcento. Du belaj romanikaj pordegoj kondukas al la navo. Sur la transepta kruciĝo, sur turo, staras lanterneto (16-a jarcento), ŝuldata al *Johano de l'Espine*. Tre bela romanika kriptoj videblas.

L'Église de la Trinité

Elle dépendait de l'abbaye voisine du Ronceray et date de la seconde moitié du XII^e siècle. Deux belles portes romanes mènent à la nef. Sur la croisée du transept, sur une tour, se dresse une lanterne (XVI^e siècle), due à Jean de l'Espine. Une très belle crypte romane est visible.



La hotelo de la Pentofarantinoj

Konstruita fine de la 15-a jarcento, ĝi estis rifuĝejo, poste monaĥinejo por diboĉulinoj, kiuj deziris penti. La hotelo, gracia konstruaĵo parte gotika parte renesanca, prezentas panoramon de la evoluo de la flamgotika arkitekturo ĝis la arto de la dua Renesanco (2-a parto de la 16-a jarcento). Ĝi estis klasita kiel historia monumento en 1901, kaj poste malrapide restaŭrita ekstere.

L'hôtel des Pénitentes

Construit à la fin du XV^e siècle, il fut un refuge, puis un couvent pour femmes débauchées qui voulaient se repentir. L'hôtel, gracieux édifice, en partie gothique et en partie Renaissance présente un panorama de l'évolution de l'architecture depuis le style flamboyant jusqu'à l'art de la seconde Renaissance (2^e partie du XVI^e siècle). Il a été classé monument historique en 1901, puis progressivement restauré à l'extérieur.



La abatejo de Asnières

La konstruaĵo estis komencita dum la 12-a jarcento, ekde la suda brako de la transepto, la transepta kruciĝo, la suda transeptero, kaj ĝia absideta kapelo en formo de duonluno. La ĥorejo kaj la transepto konserviĝis ĝis nun, kun sia tuta beleco, same kiel la sonorilturo.

L'abbaye d'Asnières

La construction a été commencée au XII^e siècle, à partir du bras sud du transept, de la croisée du transept, du transept sud et de sa chapelle absidiale en forme de croissant. Le chœur et le transept ont été conservés jusqu'à présent, dans toute leur beauté, ainsi que le clocher.



La Apoteko en Baugé

Konsiderita unu el la plej malnovaj kaj plej bone konservitaj en Francio, la apoteko en *Baugé* estas eksterordinara juvelo de la 17-a-jarcenta farmakopeo. Konstruita kaj garnita ĉirkaŭ 1675, tiu apoteko daŭre funkciis en la 1940-aj jaroj. Ĝi estis klasifikita kiel Historia Monumento en 1947.

L'Apothicaiererie de Baugé

Considérée comme l'une des plus anciennes et mieux conservées de France, l'apothicaiererie de Baugé est un formidable joyau de la pharmacopée du XVII^e siècle. Aménagée et garnie vers 1675, cette officine était encore en activité dans les années 1940. Elle a été classée au titre des Monuments Historiques en 1947.



Malsanulejo de Baugé

En la granda malsanula ĉambro, malkovru la resanigan arton kaj la ĉiutagan vivon de hospitalo en la 17-a jc per objektoj de tiu periodo. Poste admiru la barokan kapelon kaj ĝian duoblan ĥorejon, antaŭ ol transiri la loĝlokojn de la hospitalaj fratinoj de Sankta Jozefo. Pliagrabligu vian viziton promenant tra la kuracherba ĝardeno de la kvadrata korto.

L'Hôtel-Dieu de Baugé

Dans la grande salle des malades, découvrez l'art de guérir et le quotidien d'un hôpital au XVII^e siècle à travers les objets de l'époque. Admirez ensuite la chapelle baroque et son double chœur, avant de traverser les lieux de vie des hospitalières de Saint-Joseph. Agrémentez votre visite en flânant dans le jardin des simples de la cour carrée.



La Vera Kruco de Anĵuo

Tiu kruco estas konservata en la kapelo *Girouardière* en *Baugé*. En 1241, la anĵua Krucisto *Jean d'Alluye* revenis al Anĵuo kun kruco ĉizita el parto de la "reala" kruco laŭ la bizanca stilo, tio estas kun du transversoj. Duko Ludoviko la 2-a enskribis la krucon en sian blazonon, kaj ĝi tiel iĝis la *Kruco de Anĵuo*. Lia filo duko *René* la 1-a, edziĝante kun Isabelle de Loreno, alportis la emblemon al ŝia familio en Loreno. Ekde tiam, la emblemo de la *Kruco de Anĵuo* ankaŭ fariĝis la *Kruco de Loreno*, adoptita de generalo *De Gaulle* en 1941.

La vraie croix d'Anjou à Baugé

Cette croix est conservée dans la chapelle de la Girouardière à Baugé. En 1241, le croisé angevin Jean d'Alluye revint en Anjou avec une croix taillée dans une partie de la "vraie" croix selon le style byzantin, c'est-à-dire avec deux transversales. Le duc Louis II inscrivit la croix dans ses armoiries, et elle devint ainsi la Croix d'Anjou. Son fils le duc René 1^{er}, épousant Isabelle de Lorraine, apporta l'emblème à sa famille en Lorraine. Depuis, l'emblème de la croix d'Anjou est également devenu la croix de Lorraine, adoptée par le général De Gaulle en 1941.



La kastelo de Baugé

Tiu kastelo estas la nura grandskala konstruo entreprenita de reĝo *René*; tamen, ĝi ne montras ajnan gravan arkitekturan ambicion. En antaŭ-renesanca stilo, ĝi estis konstruita de 1454 ĝis 1465, ĉe la fino de la *flamgotika* periodo.

Le château de Baugé

Ce château se révèle être la seule construction de grande ampleur qu'ait engagée le Roi René ; néanmoins, il ne témoigne pas d'une ambition architecturale d'envergure. De style pré-Renaissance, il est édifié de 1454 à 1465, à la fin de la période du « gothique flamboyant ».



La kastelo Greziljono en Baugé

La Kastelo Greziljono en Baugé estis akirita danke al la subskripcio de esperantlingvaj donacantoj grupigitaj en kooperativa societo. La *Esperanto-Kulturdomo* estis fondita en 1951 laŭ iniciato de *Henri Micard*. Ekde tiam ĝi akceptas esperantlingvanojn el ĉiuj landoj, kiuj venas tien por turismaj kaj kulturaj restadoj. La kulturdomo proponas diversspecan programon de lingvaj kaj temaj kursoj.

Le château de Grézillon à Baugé

Acquis grâce à la souscription de donateurs espérantophones groupés en société coopérative, la Maison Culturelle de l'Espéranto a été fondée en 1951 à l'initiative de Henri Micard. Elle accueille depuis ce temps des espérantophones de tous pays qui viennent y effectuer des séjours touristiques et culturels. La maison culturelle propose un programme varié de stages linguistiques et thématiques.



La kastelo de Breil de Foin

La kastelo estas historia monumento formita el du apudmetitaj kasteloj ĉirkaŭataj de botanika parko. Mezepoke, la pli malnova kastelo defendis la Anjuan provincon je la landlimo de la regiono *Maine*. La alia konstruaĵo fakte datumas de la 16-a kaj 17-a jarcentoj. La fasado estas laŭ stilo Henriko la 4-a, kiu ligas la Renesancon kaj la klasikan epokon.

Le château de Breil de Foin

Le château est un monument historique formé de deux châteaux juxtaposés entourés d'un parc botanique. Au Moyen Âge, le plus ancien des deux bâtiments défendait la province d'Anjou à la frontière du Maine. L'autre bâtiment date en fait des XVI^e et XVII^e siècles. La façade est du style

Henri IV, qui fait la transition entre la Renaissance et l'époque classique.



La kastelo de Brézé

El la 16-a jarcento, la kastelo de Brézé havas eksterordinaran subteran reton. Vi tie malkovros la malnovan majestan domon kaj ĝiajn stalojn, remparpromenejon, levoponton, silkraŭpejon, kuirejojn, kelojn kaj grandegajn vinberpremiojn.

Le château de Brézé

Du XVI^e siècle, le château de Brézé possède un extraordinaire réseau souterrain. Vous y découvrez l'ancienne demeure seigneuriale et ses écuries, un chemin de ronde, un pont-levis, une magnanerie, des cuisines, des celliers, d'immenses pressoirs.



La kastelo de Brissac

Kromnomita la "Giganto de la Luarvalo", ĉi tiu kastelo estas la hejmo de la Dukoj de *Brissac* dum pli ol duona jarmilo. Vizito al la salonoj kaj pompĉambroj malkaŝas brilegan dekoracion de pentritaj plafonoj orfolie orumitaj.

Le château de Brissac

Surnommé le « Géant du Val de Loire », ce château est la demeure des ducs de Brissac depuis plus d'un demi-millénaire. La visite des salons et des chambres d'apparat révèle un décor éblouissant de plafonds peints et dorés à la feuille d'or.



La ŝtat-biena arbarego de Chandélais

Tiu ĉi arbaro etendiĝas sur la teritorio de kvar municipoj. Promenantoj povas pluki specimenojn de floroj, aŭ eĉ kapti fotojn de kapreoloj, aproj, vulpoj, leporoj kaj tuta faŭno pli modesta sed tre diversa.

La forêt domaniale de Chandélais

Cette forêt s'étend sur le territoire de quatre communes. Les promeneurs peuvent cueillir des spécimens de fleurs, voire capturer, en photo, des chevreuils, des sangliers, des renards, des lièvres

et toute une faune plus modeste mais très variée.



Kastelo La Lorie en La Chapelle-sur-Oudon

Konstruita en 1632 de la Ĉefa Provosto de Anĵuo, la kastelon *La Lorie* karakterizas aldonoj kaj plivastigoj kiujn sinsekvaj posedantoj entreprenis. Reliefigas la kastelon ĝia nepre videnda ĉambro: la granda marmorsalono kaj ĝia plurjarcenta ĉevalhistorio.

Château de la Lorie à la Chapelle-sur-Oudon

Construit en 1632 par le grand prévôt d'Anjou, le château de la Lorie se caractérise par les ajouts et

agrandissements que les propriétaires successifs ont entrepris. Il se remarque grâce à sa pièce phare : le grand salon de marbre et son histoire équestre de plusieurs siècles.



La preĝejo de la Sankta Koro, Cholet

Per sia bazilika plano kaj sia kupolo, ĝi memorigas rom-bizancajn konstruaĵojn. Ĝi havas la apartecon esti konstruita per ŝtalbetono vestita per lokaj materialoj : briko, oranĝkolora skisto nomita *Pineau-ŝtono*, rozkolora granito el *Saint-Macaire-en-Mauges* kaj blua granito el *Vezins*.

L'Église du Sacré-Coeur, Cholet

Par son plan basilical et sa coupole, elle rappelle les édifices romano-byzantins. Elle a la particularité d'être construite avec du béton armé habillé avec des matériaux locaux : de la brique, du schiste orangé appelé pierre de Pineau, du granit rose de Saint-Macaire-en-Mauges

et du granit bleu de Vezins.



La Tekstila Muzeo, Cholet

Instalita en iama lavejo de 1881, la Tekstila Muzeo prezentas superrigardon al la historio de la teksa industrio kaj ĝiaj teknikoj. La fama "*Ĉoleta ruĝa poŝtuko*" estas teksata ĉi tie en la Tekstila Muzeo.

Le Musée du Textile, Cholet

Installé dans une ancienne blanchisserie de 1881, le Musée du Textile présente un panorama de l'histoire de l'industrie textile et de ses techniques. Le célèbre "mouchoir rouge de Cholet" est tissé

ici au Musée du Textile.



Priora kirko N-D de Cunault

La priora kirko estas majstraĵo de romanika arto. Konstruita inter la 11-a kaj 13-a jarcentoj, la kirko *Notre-Dame de Cunault* rivelas grandan internon kaj havas longan helan ambulatorion. La konstruaĵo estas fama pro siaj 223 skulptitaj kapiteloj kaj murpentraĵoj.

Prieurale N-D de Cunault

La prieurale de Cunault est un chef-d'œuvre de l'art roman. Bâtie entre le XI^e et le XIII^e siècles, l'église Notre-Dame de Cunault dévoile un intérieur de grandes dimensions et possède un long

déambulatoire lumineux. L'édifice est célèbre pour ses 223 chapiteaux sculptés et ses peintures murales.



Bestoĝardeno de Doué-en-Anjou

La parko situas en eksa ŝtonminejo. Pli ol 1 900 bestoj trovis tie esceptan naturan medion, dediĉitan al la protekto de endanĝerigitaj specioj. Fosite en la roko, tuneloj portos vin de mondo al alia!

Bioparc de Doué-en-Anjou

Le parc est aménagé dans une ancienne carrière de pierres. Plus de 1900 animaux y ont trouvé un

cadre naturel exceptionnel, consacré à la protection des espèces menacées. Creusés dans la roche, des tunnels vous feront passer d'un monde à l'autre !



La muzeo de malnovaj butikoj de Doué-en-Anjou

Ŝirmita en belega konstruaĵo de la 18-a jarcento proksime de la rozĝardeno Foullon, ĉi tiu muzeo rakontas la historion de podetala komerco de 1850 ĝis 1950 elvokita per butikoj kun belaj montrofenestroj.

Musée des anciens commerces de Doué-en-Anjou

Abrité dans un superbe bâtiment 18^e siècle à proximité de la roseraie Foullon, ce musée retrace l'histoire du commerce de détail de 1850 à 1950 évoquée avec ses boutiques aux jolies devantures.



Trogloditoj kaj sarkofagoj en Doué-en-Anjou

Tiu ĉi tute subtera loko estis tiel fosita, transformita, aranĝita dum 1500 jaroj pro tre diversaj kialoj: fabrikado de merovidaj sarkofagoj, subtera rifuĝejo, mezepoka kapelo, pintarka kelo, instalaĵo de vinkultivisto.

Troglodytes et sarcophages à Doué en Anjou

Cet endroit totalement souterrain a ainsi été creusé, transformé, aménagé pendant 1500 ans pour des raisons très différentes : fabrication de sarcophages mérovingiens, souterrain refuge, chapelle

médiévale, cave cathédrale, installation de vigneron.



La reĝa abatejo de Fontevraud

Fondita en 1101 ĉe la limoj de Anĵuo, *Touraine kaj Poitou*, Fontevraud ŝuldas sian potencon al la *Plantagenêt* kaj al siaj proksimaj ligoj kun Eleonora de Akvitanio. Reĝino de Francio kaj poste de Anglio, ŝi interalie pasigis siajn lastajn jarojn tie. Ŝia kuŝostatuo videblas en la koro de la abateja preĝejo kune kun tiuj de Henriko la 2-a *Plantagenêt* kaj Leonkora Rikardo. Establitaj sur 13 hektaroj, la Abatejo estas la plej granda monaĥa civito heredita el la Mezepoko.

L'Abbaye royale de Fontevraud

Fondée en 1101 aux confins de l'Anjou, de la Touraine et du Poitou, Fontevraud doit sa puissance

aux Plantagenêts et à ses liens étroits avec Aliénor d'Aquitaine. Reine de France puis d'Angleterre, elle y passe notamment ses dernières années. Son gisant trône au cœur de l'abbatiale aux côtés de ceux d'Henri II Plantagenêt et de Richard Cœur de Lion. Établie sur 13 hectares, l'Abbaye est la plus vaste cité monastique héritée du Moyen Âge.



La Gasté-muelejo en Grézillé-Gennes

Tiu ĉi ventomuelejo, el tipo "*kela*" [france : *cavier*], specifa de Anĵuo, estas restaŭrita idente ekde 2008. Ĝi tiel reakiris sian harmonian kaj arogantan silueton, altan 15 metrojn, kiu ebligas al ĝiaj flugiloj kapti la venton.

Le moulin de Gasté à Grézillé-Gennes

Ce moulin à vent, de type "cavier", spécifique de l'Anjou, a été restauré à l'identique depuis 2008. Il a ainsi retrouvé sa silhouette harmonieuse et altière, haute de 15 mètres, qui permet à ses ailes de prendre le vent.



La Aeronaŭtika Muzeo en Marcé

Espace Air Passion estas la unua muzeo pri malpeza aviado en Francio, havante unikan kolekton de aviadiloj kaj glisaviadiloj, de 1908 ĝis nun. Ĝia kovrita surfaco okupas 3 500 m²

Le musée aéronautique de Marcé

Espace Air Passion est le 1^{er} musée de l'aviation légère en France : il possède une collection unique d'avions et de planeurs, de 1908 à nos jours. Il occupe 3 500 m² de surface couverte.



La Orienta Ĝardeno en Maulévrier

Tiu ĉi arbejo gastigas proksimume 300 plantspeciojn, inkluzive de azaleoj, kamelioj, rododendroj, japanaj aceroj, ginkgo biloba kaj aliaj, kun tradiciaj dekoraciaj elementoj de la japanaj ĝardenoj kiel ruĝe pentritaj torijoj, ŝtonlanternoj (Tōrō), aŭ la kopio de ĥimera budhisma templo.

Le Parc Oriental de Maulévrier

Cet arboretum abrite environ 300 espèces végétales, dont des azalées, des camélias, des rhododendrons, des érables japonais, des ginkgo biloba et bien d'autres, avec des éléments décoratifs traditionnels des jardins japonais tels que des portes peintes en rouge (torii), des lanternes en pierre (Tōrō) ou la réplique d'un temple bouddhiste khmer.



La kastelo de Montgeoffroy

Arkitektura juvelo de la 18-a jarcento, la kastelo de *Montgeoffroy* estas privata kastelo en rimarkinda konserva stato, kiu konservis sian altvaloran originan meblaron.

Le château de Montgeoffroy

Joyau architectural du XVIII^e siècle, le château de Montgeoffroy est un château privé, dans un état de conservation remarquable, qui a préservé son précieux mobilier d'origine.



La kastelo de Montreuil-Bellay

La feŭda kastelo de Montreuil-Bellay estis konstruita ĉirkaŭ 1025. El tiu ĉi periodo la barbakano, la ĉirkaŭfosaĵo kaj fortikigitaj remparoj kaj aliaj elementoj, spuroj de la Mezepoko, estas vidindaj. Elegantaj konstruaĵoj el de la 15-a jc flankas la fortikaĵon. La nova kastelo kaj la kanonika preĝejo, la loĝejo de la kanonikoj datiĝas de la 15-a kaj 16-a jc.

Le château de Montreuil-Bellay

Le château féodal de Montreuil-Bellay est bâti vers 1025. De cette époque la barbacane, les douves et remparts fortifiés, les souterrains voûtés, la cuisine à foyer central, vestiges du Moyen Âge, sont à voir. D'élégantes constructions datées du XV^e siècle flanquent la forteresse. Le nouveau château et la collégiale, le logis des chanoines datent des XV^e et XVI^e siècles.



Montsoreau

Superstaranta unu el la plej belaj vilaĝoj de Francio, la kastelo gvas la kunfluejon de la riveroj *Vienne* kaj *Loire*. Konstruigita ĉirkaŭ 1450 de *Jean de Chambes*, konsilisto de Karlo la 7a, la kastelo supervivis la Religiajn Militojn. *Aleksandro Dumas* tie situigis la morton de la Senjoro de *Bussy*, amanto de Franciska de Maridor, la Sinjorino de *Monsoreau*.

Montsoreau

château veille sur le confluent de la Vienne et de la Loire. Construit vers 1450 par Jean de Chambes, conseiller de Charles VII, le château survécut aux guerres de Religion. Alexandre Dumas y localisa la mort du seigneur de Bussy, amant de Françoise de Maridor, la dame de Monsoreau.



Montsoreau, la kelo *Saut aux Loups*

Ĉi tiu fungo-kultivejo reuzas kelojn antaŭe dediĉitajn al la eltiro de glimkreto. Vi malkovros malsam-kolorajn pleŭrotojn, ŝitakojn kaj kompreneble la faman ĉampinjonon.

Montsoreau, le Saut aux Loups

Cette champignonnière réutilise des caves autrefois dédiées à l'extraction du tuffeau. Vous découvrirez les pleurotes de différentes couleurs, les shiitakés et bien sûr le fameux champignon de Paris.



La Blua Minejo en Noyant-la-Gravoyère

La Blua Minejo rakontas la originon de ardezo, ĝiajn minadoteknikojn kaj pli larĝe, la vivojn de tiuj viroj kiuj elfosis kaj elterigis la ardezon komence de la 20-a jarcento. La vizito okazas 126 metrojn subtere.

La Mine Bleue de Noyant-la-Gravoyère

La Mine Bleue retrace l'origine de l'ardoise, ses techniques d'exploitation et plus largement, la vie de ces hommes qui ont extrait et remonté l'ardoise au début du XX^e siècle. La visite se passe à 126 mètres sous terre.



La grunda heliko de l'Orbière

Jen malgranda troglodita vilaĝo kiu ŝajnas normala sed surprize aperas ĉi tiuj du misteraj gigantaj helicoidoj kiuj transportas nin al mondo ekster la tempo.

L'Hélice terrestre de l'Orbière

Un petit village troglodytique qui semble normal et puis nous apparaissent ces deux mystérieuses hélicoïdes gigantesques qui nous transportent dans un monde hors du temps.



La kastelo Plessis-Bourré

La kastelo situas en la urbeto *Écuillé*. *Jean Bourré*, granda financisto kaj ĉefa konfidenculo de Ludoviko la 11-a, konstruigis la nunan kastelon de 1468 ĝis 1473. La vizitanto havas la iluzion ke la kastelo eliras el la akvoj kiuj ĉirkaŭas ĝin. Ĝin oni uzis por dekoroj de multaj filmoj. Multaj klasigitaj objektoj estas konservitaj interne.

Le château du Plessis-Bourré

Le château est situé sur la commune d'Écuillé. Jean Bourré, grand argentier et principal confident de Louis XI, fit construire, de 1468 à 1473, le château actuel.

Le visiteur a l'illusion que le château sort des eaux qui l'entourent. Il a servi de décor à de nombreux films. De nombreux objets classés sont conservés à l'intérieur.



La kastelo de Plessis-Macé

Meze de la 15-a jc, *Louis de Beaumont*, ĉambelano de Ludoviko la 11-a, rekonstruigis la fortikigitan kastelon starigitan en la 12-a jc kaj parte ruinigitan, laŭ flamgotika stilo. La loĝejo estis plejparte transformita en la 19-a jc. Proksimume dudek larĝaj fosto-fenestroj estas apertigitaj.

Le château du Plessis-Macé

Au milieu du XV^e siècle, Louis de Beaumont, chambellan de Louis XI, fait reconstruire le château-fort édifié au XII^e siècle et en partie ruiné, en style gothique flamboyant. Le logis a largement été transformé au XIX^e siècle. Une vingtaine de larges fenêtres à meneaux sont ouvertes.



La Kanguruo-Ĝardeno en La Possonnière

Ĉirkaŭ cent marsupiuloj estas liberaj en 8-hektara parko, en la koro de malgranda valo. La vizitantoj observas ilin el la vojoj senbarilaj kaj amuze kaj eduke malkovras.

La Possonnière, le Jardin des Kangourous

Une centaine de marsupiaux sont en liberté dans un parc de 8 hectares, au cœur d'une petite vallée. Les visiteurs les observent depuis les chemins, sans barrières, et font une découverte ludique et pédagogique.



Rochemenier

Du eksaj subteraj farmbienoj kun loĝejoj kaj kromdomoj fositaj en glimkreto ŝirmas kelkajn centojn da iloj kaj kamparanaj mebloj (nuksoleo-premilo, vinberpremiloj, panbakujoj, plugiloj, hejmaĵoj, ktp.). Rochemenier estas la plej kompleta troglodita vidindejo en la Luarvalo.

Rochemenier

Deux anciennes fermes souterraines avec habitations et dépendances creusées dans le tuffeau abritent plusieurs centaines d'outils et de mobilier paysan tel que pressoir à huile de noix, pressoirs à raisins, moulins à pain, charrues, articles ménagers... Rochemenier est le site troglodytique le plus complet du Val de Loire.

raisins, moulins à pain, charrues, articles ménagers... Rochemenier est le site troglodytique le plus complet du Val de Loire.



Saint-Aubin-de-Luigné

Ĉi tiu urbeton trafluas la rivero *Le Layon*. Vizitindas la feŭda kastelo el la 13-a jarcenta (imponaj ruinoj) same kiel la urbodomo, iama pastra domo, vera juvelo de la Renesanco, kiu devenas de la komenco de la 16-a jarcento.

Saint-Aubin-de-Luigné

Cette petite ville est traversée par la rivière Le Layon. Le château féodal du XIII^e siècle (ruines impressionnantes) est à visiter ainsi que l'hôtel de ville, ancienne maison de curé, véritable joyau de la Renaissance, qui date du début du XVI^e siècle.



La Metio-muzeo en St-Laurent-de-la-Plaine

La muzeo prezentas 12 ekspoziciajn ĉambrojn montrantajn ilojn el metioj ŝton-, lign-, metal-, ter-, teks- kaj led-rilataj: la kolektoj transportas vin en fakan etoson de metia kaj kampara mondoj komence de la 20-a jarcento.

St-Laurent-de-la-Plaine, le musée des Métiers

Le musée présente 12 salles d'exposition, composées d'outils issus des métiers de la pierre, du bois, du métal, de la terre, du textile et du cuir : ses collections vous plongent dans l'univers de

l'artisanat et du monde rural au début du XX^e siècle.



La kastelo de Saumur

Palac-kastelo de la Dukoj de Anĵuo en la 14-a kaj 15-a jarcentoj, la kastelo de Saumur, en kiu loĝis la reĝo René, estas la lasta ekzemplo de la princaj palacoj konstruitaj de la dinastio de Valois. Loĝejo de la guberniestroj de la Urbo, malliberejo, kaj poste deponejo de armiloj kaj municioj, ĝi nun estas "*Musée de France*".

Le château de Saumur

Château-palais des Ducs d'Anjou aux XIV^e et XV^e siècles, le Château de Saumur, dans lequel a

résidé le Roi René, est le dernier exemple des palais princiers érigés par la dynastie des Valois. Résidence des gouverneurs de la Ville, prison, puis dépôt d'armes et de munitions, il est maintenant "Musée de France".



La kastelo Serrant

La kastelo estas plejparte el Renesanca stilo, konstruita anstataŭe de mezepoka kastelo el ardeza skisto. La ĉirkaŭfosaĵo atestas la periodon kiam Serrant estis fortikaĵo gvatanta la trairejon de la Luaro. Tiu fosaĵo originas de antaŭekzistinta mezepoka kastelo.

Le château de Serrant

Le château est essentiellement de style Renaissance, construit à la place d'un château médiéval en schiste ardoisier. Les douves témoignent de la période où Serrant était une place forte surveillant le passage de la Loire. Ces fosses datent du château médiéval préexistant.



La akvomuelejo l'Engrenage en Villevêque

La Froment-muelejo, citita en la arkivoj de la 13-a jarcento, estis restaŭrita komence de la 20-a jarcento kaj la mekanismoj refunkciigitaj en 2012. Nun ĝia nomo estas *Engrenage*. Ĝi fariĝis eduka kaj turisma ejo kaj produktas elektron.

Le moulin de l'Engrenage à Villevêque

Le moulin de Froment, cité dans les archives du XIII^e siècle a été restauré au début du XX^e siècle et les mécanismes remis en mouvement en 2012. Il porte maintenant le nom de l'Engrenage. Il est devenu un site pédagogique et touristique et produit de l'électricité.

--- DEPARTEMENTO MAYENNE ---



Pierre et Gilles Corbineau.

La Ursulina monaĥejo en Château-Gontier

La kreado de la Ursulina monaĥejo datiĝas de la 17-a jarcento. En 1634, la monaĥinoj ekokupis elegantan konstruaĵon. La senjora biendomo *La Touche*, kiu konsistigas la kernon de ilia monaĥejlernejo, estas integrata al la monaĥej-konstruaĵoj konstruitaj ekde 1642, fare de *Pierre kaj Gilles Corbineau*.

Château-Gontier, le couvent des Ursulines

La création du couvent des Ursulines remonte au XVII^e siècle. En 1634, les religieuses prennent possession d'une élégante construction. Le manoir seigneurial de la Touche, qui constitue le noyau de leur couvent-école, s'intègre aux bâtiments conventuels édifiés à partir de 1642 par



La kastelo de Craon

La kastelo de *Craon* estas eleganta kastelo el glimkreto konstruita je la fino de la 18-a jarcento. Ĝia arkitekturo, plejparte inspirita el *Versailles*, ricevigis al ĝi la kromnomon *Eta Versailles en Mayenne*.

Château de Craon

Le château de Craon est un élégant château en tuffeau datant de la fin du XVIII^e siècle. Son architecture largement inspirée par Versailles lui vaut le surnom de Petit Versailles de la Mayenne.

--- DEPARTEMENTO SARTHE ---



La bestoĝardeno de La Flèche

Fondita en 1746, tiu bestoĝardeno etendiĝas sur grandega 8-hektara arbarkovrita parko. Planu tutan tagon por observi la emblemojn de biodiverseco laŭ via ritmo: leonoj, gepardoj, ĝirafoj, rinoceroj, sumatraj tigroj, polusaj ursoj, birdoj...

Le zoo de La Flèche

Fondé en 1746, le zoo de La Flèche s'étend sur un immense parc arboré de 8 hectares. Prévoyez une journée entière pour observer à votre rythme les emblèmes de la biodiversité : lions, guépards, girafes, rhinocéros, tigres de Sumatra, ours polaires, oiseaux...



La kastelo Le Lude

lama mezepoka fortikaĵo transformita en plezurloĝejon dum la Renesanco, la kastelo *Le Lude* restas unu el la lastaj grandaj Luar-kasteloj daŭre loĝataj.

Le château du Lude

Ancienne forteresse médiévale transformée en demeure de plaisance à la Renaissance, le Château du Lude demeure l'un des derniers grands châteaux de la Loire encore habités.

--- DEPARTEMENTO INDRE-ET-LOIRE ---



La abatejo de Bourgueil

La abatejo *Saint-Pierre de Bourgueil* estis fondita en 990 de Emma, Grafino de *Blois* kaj Dukino de Akvitanio. En 1156, *Henri II Plantagenêt* okazigis la Ĝeneralan Kunvenon de siaj provincoj tie. La unua romanika monaĥeja preĝejo havis sep-etaĝan turon enhavantan kariljonon de naŭ sonoriloj. Dum la Renesanco, la abatejo estis reĝa fondaĵo kaj baronlando. En 1782 ekoficis la lasta abato en *Bourgueil*.

L'Abbaye de Bourgueil

L'abbaye Saint-Pierre de Bourgueil est fondée en 990 par Emma, comtesse de Blois et duchesse d'Aquitaine. En 1156, Henri II Plantagenêt y tient les États généraux de ses provinces. La première

église abbatiale romane comporte une tour de sept étages abritant un carillon de neuf cloches. À la Renaissance, l'abbaye est une fondation royale et une baronnie. 1782 voit l'avènement du dernier abbé de Bourgueil.



La urbo Richelieu

Modelo de urboplanado el la 17-a jarcenta, la urbo ŝuldas sian nomon al sia fondinto, kardinalo *Richelieu*. Estas vasta kvarlatero ĉirkaŭita de muroj flankitaj de ĉirkaŭfosaĵoj. Aliro eblas per 3 monumentaj pordoj. La ĉefstrato estas borderita per 28 privataj domegoj.

Richelieu, la ville

Modèle d'urbanisme du XVII^e siècle, la ville doit son nom à son fondateur, le Cardinal de Richelieu. C'est un vaste quadrilatère entouré de murs flanqués de douves auquel on accède par 3 portes

monumentales. La grande rue est bordée de 28 hôtels particuliers.

--- DEPARTEMENTO VIENNE ---



Muzeo Renaudot en Loudun

Vi malkovros la vivon de la kuracisto *Théophraste Renaudot* per dokumentoj pri la tiama praktiko, liajn diplomojn de la Universitato de *Montpellier* kaj lian laboratorion. Sed ankaŭ lian vivon kiel ĵurnalisto, kun reelvoko de lia pariza laborejo, kie li eldonis *La Gazette* [la Gazeto], konsiderata kiel la unua perioda gazetara titolo en Francio.

Musée Renaudot à Loudun

Vous y découvrirez la vie du médecin Théophraste Renaudot grâce à des documents sur la pratique de l'époque, ses diplômes de l'université de Montpellier ou encore son laboratoire. Mais aussi sa vie

de journaliste, avec une reconstitution de son atelier parisien où il a fait paraître la Gazette, considérée comme le premier titre de presse périodique en France.

--- DEPARTEMENTO DEUX-SÈVRES ---



La kastelo de la Roche en Argenton-l'Église (Le château de la Roche)

Temas pri ensemblo el la 19-a jarcento en novrenesanca stilo, konstruita el glimkreto. La starigo okazis de 1860 ĝis 1862, en la loko, kie pli malnova konstruaĵo estis (verŝajne de la 17-a jarcento).

Le Château de la Roche à Argenton-l'Église

C'est un ensemble du XIX^e siècle de style néo-Renaissance, construit en tuffeau. Les travaux ont été effectués de 1860 à 1862 à l'emplacement d'un édifice plus ancien (probablement du XVII^e

siècle).

Noto: Bedaŭrinda teknika eraro al ni konfuzigis la ovalan ĉambron de la Bibliothèque Nationale de France (BNF Richelieu) [Nacia Biblioteko de Francio] kun nia propra bibliotekejo. Memoru, ke la BNF enhavas 16 milionojn da libroj kaj kompilaĵoj, 410 000 periodaĵojn kaj multajn aliajn trezorojn. Kvankam la nia estas iom pli modesta, estu certa, ke ni tre plezure bonvenigos vin en nia loka "Esperantio".